

V-19119/16

(1954)

N. 1/2 - 3/4, n/12

ISAE

# OOMOTO

MONATA ORGANO DE OOMOTO



1954 1-2

*16-a Jaro N-ro (163-164) Administracio: Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo*  
*Abonprezo: ¥360 por unu jaro; \$ 1.20 aŭ 18 Steloj por eksterlando: Abonebla*  
*ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.*

## Oomoto en Tokio

Pasis jam plene ok jaroj de kiam ni deklaris la restarigon de Oomoto en 1946. La nombro de niaj filioj kreskis ĉiujare ĝis superi jam sescent. Antaŭ du jaroj ellaboriĝis la rekonstruado de Mirokuden, la Ĉefa Preĝejo, kun pli granda amplekso ol antaŭe. Nomiĝis preskaŭ kvarmil propagandistoj, kiuj sindone laboras por la sankta misio. Ŝajnas, ke la tuta organizo de Oomoto-movado reakiris eĉ pli fortikan bazon ol antaŭ la persekuto. Ni nur bedaŭras, ke ankoraŭ mankas multe da necesaj konstruaĵoj en Ajabe kaj Kameoka; precipe en Tokio, la ĉefurbo, malhavo de konvena domo estis nia longa plendo, sed en la lasta aŭtuno, dank' al forta atentigo de la Majstrino, S-ino Naohi, pri la graveco de Tokio oni unuanime decidis la planon aĉeti aŭ konstruigi domon, kiu taŭgos kiel la centro de Oomoto en la ĉefurbo. La afero rapide progresis kaj en la fino de Januaro ni jam akiris unu bonan terenon, se ne tre vastan, apud la fama parko de Ueno. Sur la tereno nun staras modestaj domoj, kiuj kompreneble estas en nia dispono, sed oni rapide konstruigos apud ili novan domon, kiu servos ne nur kiel preĝejo sed ankaŭ kiel oficejo kaj eĉ gastejo. Lokaj Oomotanoj, kiuj veturos al la ĉefurbo, estos tie gastigataj; ankaŭ eksterlandaj samideanoj estos tute volonte akceptataj, nur se ili ne atendos tro luksan komforton krom elkora gastamo.

Tokio, la ĉefurbo, estas centro ne nur de la politiko, sed ankaŭ de diversaj kulturaj kampoj. Ĝi estas centro ne nur de Japanujo, sed ankaŭ de l' Orienta Azio. Do akirinte tie taŭgan sidejon nia movado faros rimarkindan marŝon antaŭen, donante influon al diversaj flankoj, ankaŭ en internacia skalo.

*La Redakcio*

Wk/102/1/23

## Kio estas la Vera

*Onisabro Deguči*

Multaj el la librovermaj kleruloj, kiuj formanĝis al si mil volumojn da libroj, ofte ne konas eĉ la plej trivialan aferon. Kiuj avide legas mil kaj mil vortojn certe estas la ne-praktikantoj je unu vorto.

Kiuj skribemas manipulante l' plumon kaj elcerbumante al si l' frazojn, kaj kiuj parolemas torente, inter tiuj sin trovas ja neniu, kiu estas netakseble-grandioza. Post ĉiu skribo aŭ parolo ilia cerbo estas malplena. Kion ili skribis aŭ parolis, per tio oni povas plene taksi ilian menson. Vere mezureblaj homoj ili nur estas. Ĉio, kion ili esprimas, estas la vera kopio de ilia menso, — la vera kopio; sed ne la kopio de la vero, ĉar la vero, jam esprimita per buŝo aŭ plumo, ne plu povas esti la vero mem, sed ĝi estas la ombro de la vero.

Malgraŭ ĉio, la *“silenta birdo de mondsavo”* ne povus flugi, se mankus al ĝi l' flugiloj de parolo kaj skribo. Kaj tamen ankaŭ estas fakto, ke per unuopa fluto la popolamaso estas savebla kaj el unuopa popolkanto la destino de unu lando, ĉu prospera aŭ perea, estas divinebla.

Iam “oni flutis al vi, kaj vi ne dancis.” Sed hodiaŭ la homoj ne dancas tiel longe, kiel oni al ili ne kantas. Eĉ se ili dancas, ili dancas nek el la abundo de la koro, nek pro ekstazo. Nenatura estas ilia danco. Nur la natura estas la vera.

Nur la verkoj faritaj sen konscio de farado estas la verkoj en la vera senco de la vorto. Ĉiuj verkoj faritaj kun konscio de farado estas verkaĉoj. Artefaro — ĝia nomo estas detruo. Oni povus diri, ke la moderna epoko estas la tempo, en kiu abundas detruoj. Detruemaj estas la homoj. Ili ne kapablas krei al si l' idojn, sed kiom multaj el ili mortigas ilin ne nur spirite sed fizike! Oh, senhontaj estas la modernaj homoj, ke ili mortigante siajn idojn ĉiam kulpigas Iun, sed neniam sin mem.

*10. 2960/68*

*Hidemaru Deguči*

## Memornoto

Kiel la homo per la kvin sentorganoj perceptas certagrade fenomenojn de la fizika mondo, tiel li per la spirita sentorgano povas iugrade senti fenomenojn de la spirita mondo.

La spirita sentorgano de la homo sur la tero estas tiel materi-umita, ke li preskaŭ ne plu povas ekzakte koni spiritaĵojn. Sed “senti la atmosferon” ne estas tiel malfacile por ĉiu, kiu tenas la animon egale kaj trankvile.

La homaj koroj estas tiel mirindaj, ke ili komunikas inter si tuje kaj senpere. Ĉia intenco kaŝita en la koro de iu klare respugliĝas al ĉiu, kies koro estas vere egala kaj senmakula.

Se mi estas kun gaja knabeto, mia koro fariĝas ial agrabla kaj vigla; se mi estas kun ĵaluza virino, mia koro fariĝas ial griza; se mi estas kun kadukulo, mia koro ial velkiĝas; se mi estas kun saĝulo, mia koro ial sentas sin klerigita ktp., ktp. Kion mi jam tute forgesis, tio apenaŭ revenas al mia konscio, kiam venas apud min tiu, kiu tion ankoraŭ bone memoras.

Ofte okazas, ke iu ĉeestanto apud mi antaŭparolas ĝuste tion, kion mi ĵus intencas eldiri. Kun nigraj koroj ni nigre saturas la spiritan aeron de l' medio kaj sekve, la atmosferon de la tuta mondo. La plej grava afero por ĉiu estas purigi al si la korojn. Se tio ĉi estus plenumita de la homaro, la mondo estus feliĉa loko eĉ se ni malhavis tramojn kaj aeroplanojn.

La temperamento de iu fariĝas klara al ni nur per ioma interrilato kun li. Tio estas ne tiom kiel la rezulto de ekstera

observado, kiom pro la leĝo de interna interkomunikado.

Neniu kapablas tute kaŝi tion, kion li nun pensas en la koro.

La homoj lasas sin trompi per "ŝajnigoj," nur tial ke ili kredas, ke oni ne povas travidi la internon, sed ili sciu, ke nenio restas *maltrafa*, kio estas celata al iu per nia koro. Tiu ĉi fakto estas tre grava, precipe el la vidpunkto de edukado al infanoj, ĉar ilia karakterformado dependas de la karaktero de la instruanto.

Kiom ajn iu estas "denaske inteligenta," se li mem ne spertas kaj se li ne kreskigas al si la sanan prudenton, lia horizonto pli kaj pli fariĝas malvasta kaj malalta. Junuloj memvole travivu diversajn spertojn kaj lernu mem diversajn aferojn dum la juneco ilin gloras! Sen fekunda sana prudento kaj abunda sperto, ili estos sentaŭgaj por solvi diversajn problemojn en la socio, kiuj ofte sin prezentas tre komplikitaj; ili embrasas sin tre facile, ili fine ruinigas sian vivon kaj finfine malbenas aliulojn.

La tiel-nomata "bono" aŭ "malbono" ofte estas falsa en la lumo de la vera saĝo.

La mondo estas tia, ke en "vero" sin trovas "malvero," kaj en "malvero" sin trovas "vero." Tial ni devas nin adapti al la cirkonstancoj por ke ni povu ĉiam kaj ĉie ĝuste distingi inter vero kaj malvero, kaj ni ne devas konsideri la "kutimojn" kaj "leĝojn" kiel la absolutajn principojn.

La vortoj de "biblioj" kaj "maksimoj" havas sian propran meriton, ke en tre konciza formo ili ofte edifas la homojn, sed ankaŭ estas multaj aktualaj okazoj, en kiuj ili nur servas por konfuzi kaj erarigi la homojn. Tia erarigo venas de tio, ke en la homa mondo oni kutimas rigardi la "bibliojn" kaj la "maksimojn"

kiel *absolutajn* principojn. Ili povas esti reguloj nur principaj, sed tute ne absolutaj, kaj neniel aplikeblaj unuforme al ĉiu ajn homo kaj en ĉiu ajn okazo.

Escepte de neeviteblaj okazoj, sub nenia pravigo la homo estas permesata ĝeni aliulojn.

Memmortigoj estas agoj tro egoistaj. Se "ĉiu pafas sin for, lasante ĉion for," sur kiu la mondo sin apogu?

Elteni suferon eĉ pli grandan ol morto kaj viktimiĝi pro la bono de aliuloj estas la devo de la homo.

Tio montras malfortecon de la menso kaj korpo, ke de l' frua juneco iu ekstreme amas nur literaturon. En ĉio regas la "leĝo de interkorespondo."


Altrudi iun eĉ pro bonkora korektado estas erarego. Forigu tion, kio kaŭzas lian malbonan kutimon, kaj li estos nature kuracita.

Kutimiĝu por ĉiam forgesi la pasintecon.

Natura estas la koro de infano kiu vivas por ĉiu nuna momento, pensante nek pri la pasinteco, nek pri la estonteco. La infano ne kroĉiĝas al la pasinteco, nek planas por la estonteco, kaj sekve, ĝia koro estas egala kaj trankvila.

La matura homo suferas tial, ke li estas tro okupita nur de sia propra memo, ignorante, ke li estas estaĵo kreita kaj movata.

Tro multa pensado faras la homon perpleksa. Gaje vivu la vivon tian, kia ĝi estas; gaje vivu la vivon tian, kia ĝi estos. Feliĉa estas tiu, kiu plene vivas sian vivon en ĉiu momento kaj en ĉiu tago, strebante plejbone kaj forgesante sin mem.



## KRESKANTECO DE L'

ĈIOMO\* (2)

Ernest Dodge (Usono)

Jen tiu UNIVERSALA TEOREMO:

“Se ni komencas kun la aksiomo (nepre diktita de la postuloj de l' homa koro) ke la universo havas *celon* por sia ekzisto, *celon gradon-post-grado atingeblan*, tiam oni devas kredi vera la jenan rezonadon:

“Oni devas agnoski, ke la du eternecoj — eterneco de tempodaŭro pasinta kaj la eterneco de tempodaŭro venonta — estas (rilate al siaj respektivaj enhavo de faritaĵoj aŭ farotaĵoj — *ne* egalaj inter si, sed tute kaj supermezure *malegalaj*. Tion ni scias pro la dilemo de sinkontraŭdiroj inter kiuj ni devus elekti, se ni provus kredi la malon, nome, ke la du eternecoj estas, laŭ enhavo kaj signifo, egalaj inter si.

“Ĉar se ni provus kredi ilian egalecon anstataŭ ilian malegalecon, ni devus aŭ hipotezi

ke la eterneco jam pasinta *estis sufiĉa* por plenumi la celon de l' universo, aŭ hipotezi ke ĝi *ne* estis sufiĉa. Kaj ĉiu el la du hipotezoj tirus nin en sinkontraŭdiron.

“*Unue*: se ni hipotezus ke la pasinta eterneco *sufiĉis* por plenumi la celon de l' universo, tiam la eterneco ankoraŭ venonta estus nur superfluaĵo, io nenecesa, sensignifa. Kaj tial ĝi ne povus esti la egalo de l' eterneco pasinta. Ĉar evidente aferon kiu estas sen signifo oni ne povas taksu egala kun afero havanta senliman signifon. Alivorte, la hipotezo pri sufiĉeco de pasinta eterneco kontraŭdiras la provizoran hipotezon de egaleco inter pasinto kaj estonto.

“*Due*: se ni kontraŭe hipotezus, ke la pasinta eterneco *ne* sufiĉis por plenumi la celon de l' universo, tiam la eterneco vononta (laŭ tiu hipotezo nur egala al eterneco pasinta) ankaŭ

\* Ĉar tiu ĉi estas la filozofia traduko, mi preterlasis kelkajn novajn vortojn, kiujn la aŭtoro uzas, kiel necesajn terminojn. — La Red.

ne sufiĉus. Kaj tiel la plenumo de l' celo de la universo estus neblaĵo, eĉ por la tut-tuto de eterneco (pasinta kaj venonta), kaj tio estus supozo kontraŭa al la fundamenta aksiomo per kiu ni komencis.

“Pro la supraj kontraŭdiroj nun restas, kiel sola pordego de eliro el la sinkontraŭdiroj, la nepra konstato ke la du eternecoj (la pasinta kaj la venonta) estas, je enhavo kaj signifo de farataĵoj, supermezure aŭ infinite *malegalaj*; kaj la venonta eterneco supermezuros la pasintan ĝis tioma grado laŭ kiu la matematika senlimeco supermezuras ĉiun simplan kvanton, aŭ (aliel dirite) same kiel ĉiu matematika nombro supermezuras la matematikan nulon.”

Por pli bone kompreni la signifon de l' UNIVERSALA TEOREMO, oni povas trovi analogion en serio de nombroj, aranĝitaj laŭ la tiel nomata “geometria progresado”, se la nombro de termoj estas senlima.

Ĉar se oni, komencante ĉe la nuno, rigardas malantaŭen preterlime en la eternecon pasintan, la serio de statoj de l' universo antaŭ la nuno — renversdirekte rigardataj — havas

analogion kun ia *konverĝa* serio. Plej facila ekzemplo de konverĝa serio estas 1, 1/2, 1/4, 1/8, ktp. ĝis senfineco. La plejble plej minimuma termo en tiu serio estas Nulo, kaj la sumo de ĉiuj termoj estas la simpla nombro 2.

Sed se oni, komencante ĉe la nuno, rigardas antaŭen, senlime en la eternecon venontan, la serio de sinsekve okazontaj statoj de l' universo havas analogion al *diverĝa* serio. Plej facila ekzemplo de diverĝa serio estas 1, 2, 4, 8, 16, ktp., kaj se la nombro da termoj estas senlima, senlimaj kaj nemezureblaj estas ankaŭ la imagata plejble “lasta termo”, kaj ankaŭ la sumo de ĉiuj termoj.

Se nia menso kapablas agnoski verecon en la Teoremo, ne plu tantalizos nin la peza penso, ke la kompara malsukceso de l' pasinta universo — rilate al atingo de celoj sufiĉe bonaj por doni kontenton al la homa (aŭ Dia) koro, malpermesas al ni havi daŭran esperon rilate al la eterneco de tempaĵoj ankoraŭ travivotaj. Male al tio, la Espero ĉiam restas kaj restos.

— La fino —

## “Konohana-sakura”

Novspeca Ĉerizarbo Eltrovita de S-ino Naohi Deguĉi


Ni foje informis, ke s-ino Naohi Deguĉi, nuna Gvidantino, havas speciale intereson zorgi pri la Kamejama Botanika Ĝardeno. Ŝi ofte supreniras montojn aŭ montetojn por kolekti aŭ desejni malofte-vidatajn kreskaĵojn. Ne estas strange, ke ŝi kutimas reveni kun maloftaj plantaĵoj ĉiufoje, kiam ŝi rondvojaĝas provincojn. Tiele ŝia intereso kreskis kun jaroj sufiĉe profunde kaj science.

Estis en la 14-a de aprilo de l' lasta jaro. La Ĝardeno ĉarme montris siajn multkolorajn vestojn sub la favoro de printempo. Interalie ĉerizarboj, troviĝantaj en ĝi tie kaj ĉi tie, akiris homajn admirojn per sia bela plena florado. Farante tagmezan promenon tra la Ĝardeno, s-ino Naohi hazarde altiriĝis al unu ĉerizarbo, kiu staras ĉe la laĝeto en angulo de l' Ĝardeno. Ĝi estas sep aŭ ok metrojn alta, travivinta jam preskaŭ cent tridek jarojn. Supozeble la nekutimaj florfiguroj kaptis al ŝi la okulojn. Ŝi momenton estis kvazaŭ alnajtita al la arbo. Stranga emocio trakuris ŝin kiel fulmo. Unika speco? Ŝi minutojn hezitis, sed rapidis al la kabano por serĉi s-ron Takeuĉi. Plejofte li dejoras tie dum la tago. Li estas eminenta botanikisto kaj laboras jam tri jarojn kiel la direktoro de la Ĝardeno. Ili ambaŭ rapide reiris al la ĉerizarbo kaj zorge esploris pri ĉiuj detaloj. Jen, miro! S-ro Takeuĉi ne povis rememori eĉ similajn al ĝi el sia kono, kaj hontis ke li ĝisnun tute ne rimarkis tion, malgraŭ ke li pensis sin spertulo en ĉiuj aferoj de la Ĝardeno.

Ĉu ĝi estas novspeca? Dum ili estis maltrankvilaj inter espero kaj suspekto oni senprokraste skribis la novaĵon kun demando al d-ro Gen'ĉi Koizumi, mondfama, unusola kompetentulo pri la

familio *Prunus serrulata*. La doktoro, kiu loĝis en la urbo Jonezaŭa — lastatempe li mortis pro malsano — estis eksprofesoro de Kioto Universitato kaj havis speciale intiman rilaton kun s-ro Takeuĉi, ĉar iam la lasta laboris en la universitato kiel lekcianto. Dank' al lia ekspertizo kaj rekomendo, la ĉerizarbo, kiun eltrovis s-ino Naohi, determiniĝis *novspeca* en la sciencista rondo.

Tio tre ĝojigis japanajn samkredantojn. Vere tio estas notinda tiom pli ke la hejmloko de l' ĉerizarboj troviĝas nenie en la mondo ekster Japanujo kaj la japanoj de la antikva tempo amis kaj amas la florojn kiel simbolon de sia koro. Okaze de la lasta somera festo oni faris la ceremonion por la nomado de la novspeca “Konohana-sakura”.



Oficiala nomo: *Prunus Jamasakura Sieb. var. Nahohiana Koidz. et K. Takeuchi*

Japana nomo: Konohana-sakura

Loko: Provinco de Tamba: Kamejama en la urbo Kameoka (Naohi Deguĉi, 14-IV-1953)

Karakterizaĵoj:

Ĉi-speca arbo eligas siajn foliojn iom antaŭ sia ekflorado. Folio havas longforman elipson kun akra pinto kaj dentita marĝeno, kaj cetere lanugojn sur siaj retoformaj vejnoj. Floro havas hele-ruĝan korolon, konsistantan el amasaj petaloj proksimume kvardek kvin; ĝi havas kvar aŭ kvin stamenojn kaj ordinare du pistilojn, tamen malofte unu — kvar. Fruktoj estas nigre-purpuraj kaj produktiĝas po du en unu floro. (Vidu la fotojn)

Noto: S-ro Takeuĉi arde deziras interŝanĝi kun ĉiulandaj interesatoj specimenojn kaj semojn de diversaj plantoj. La Redakcio volonte peras komunikadon.

## Testamento kaj aliaj kombinaĵoj

Babilaĵo de D-ro *Adolf Halbedl*  
(Aŭstrujo)

En la lingvo latina la vorto "lingua" signifas langon kaj lingvon. La senpera rilato inter la lango kiel instrumento kaj la lingvo kiel produkto de tiu instrumento estas evidenta. La origino de tiu ĉi gravega rilato estis en la pratempo, kiam la homo kontentiĝis per ankoraŭ malmultaj ideoj komunikendaj kaj tial ankaŭ disponis pri nur malmultaj esprimoj, kiuj devis komprenigi la ideojn.

Sed la pliriĉiĝo de la ideoaro okazis pli rapide ol tiu de la esprimaro. Tial la homo helpis sin per kombinado de l' ekzistantaj provizaĵoj kaj tiel kreis novajn vortojn, kiuj ofte mem naskis novajn ideojn aŭ fariĝis tiaj. Kaj la fakto de tiu ĉi kreado kaj la kontentigo de tiuj kreaĵoj efikis, ke tiaj kombinoj malnovegaj ankoraŭ nun estas uzataj, ja ofte perdinte sian originan signifon.

Unu el la ofte uzitaj radikoj estas la latina "mens" = spirito, malo de la korpo, karaktero de la homa animo, kiu tiam prae havis multe pli da graveco ol en la nuna epoko de senbrida materialismo. Ĝi servis por la kombino de tiel gravaj vortoj kaj komprenaĵoj, kiaj estas firmamento, sakramento, paramento, testamento, elemento, instrumento, k. a. Kion diras kaj diru ĉi tiuj vortoj?

La kreemaj homoj, kiuj la unuan fojon verkis kaj uzis la vorton *firmamento*, ŝajnas esti estintaj piaj kaj konsciaj, ke la menso, la animo, bezonas firman apogilon. Ĉi tiun ili trovis super si inter kaj super la stelaro, kie pro ties kolosa mekanismo ili imagis la sidejon

de la Plej Alta, de la kreinto kaj mastro de l' universo. Do rigardo al kaj scio pri tiu Grandegulo firmigis ilian menson, la animon, kaj spertigadis ilian posteularon pri la sama apogo. Tial oni nomis la arkaĵon super la tero firmamento kaj kontentigis per tiu ĉi genia trovo ankaŭ la sekvintajn generitulojn ĝis niaj tagoj.

Por pli valorigi la menson en la lumo de l' eterneco, por helpi ĝin en la vivon transmondan, la katolika eklezio deklaris tiujn institutojn, kiujn Kristo mem instalas, *sakrigaj* helpiloj, nomante ilin *sakramentoj*, ĉar laŭ ĝia intenco kaj konvinko ili taŭgigas la homan animon por la vivo eterna.

Pli terana kaj subtenila estas la *paramento*, liturgia vestaĵo, kiu havas la taskon, plifaciligi la edifiĝon de la menso dum diservo en la plej vasta senco de la vorto. Malhavante konvenan esprimon en la lingvo latina kaj trovinte ĝin en la jam lernita lingvo greka oni kombinis la greklingvan prefikson "para" kun la latina "mens" kaj ricevis la nun kutiman esprimon paramento, kies estiĝo kaj vera signifo estas nuntempe ne pli konsciata ol tiu de la aliaj similaj kombinitaj fremdvortoj en la niatagaj lingvoj naciaj.

Kion mi diru pri elemento, testamento, dokumento, instrumento? Laŭ supraj linioj oni jam povas traduki, esplori ilian veran sencan kaj klopodi, ĉi tiun revalidigi. Ĉar ĉiu vorto servu al la homo ankaŭ per sia vero kaj ne plu toleru la falsigon de sia senco origina. Ioman aldonon oni tamen permesu al mi.

Por nomi iun malkomplikan materion *elemento* la homo devis ekkoni, ke ĝi povas konsistigi aliajn materiojn kaj kun kromaĵoj faras ilin komplikaj. Do la derivado de "elemento" de "mens" ne estas sensenca. Komprenaĵo kaj esprimo "elemento" estas idoj de la menso.

*Testamento* estas buŝa aŭ skriba deklaro, kies veran intencion ĉeestinto atestas por neĉeestinto(j) Testis = atestanto, -into, -onto, kaj "mens" esprimas la heredigan intencion de homo, kiu rajtas heredigi. <Ŝajnas ja, ke el la vorto "mens" formiĝis ankaŭ la germana verbo "meinen, Meinung" (opinii, -o).> Ĉi tiun klarigon eble pravigas la jurscienca komprenaĵo kaj fakesprimo "intestatus" (heredanto sen testament, pro leĝa destino).

*Dokumento* havas la saman devenon kiel paramento kaj konsistas el la greka "doxa" = fido kaj "mens". Laŭ ĉi tiuj konsistigiloj la dokumento, surprisita aŭ surskribita papero aŭ alia provaĵo, fidindigas la deklaron per si tiel, kiel ĝi estis farita, ĉar responda al la menso de la deklaringo. Tial la falsigo de dokumento estas ne nur krimo, sed unuavice ankaŭ peko kontraŭ la 8. mandato de Dio, ke oni ne mensogu, ne kalumniu.

*Instrumento* estas ilo, kiu instruas, subtenas, lertigas, por pli facile agi, fari, produkti; ĝi estas ido kaj amiko de la menso.

Ankaŭ aliaj ekzemploj prezentiĝas. Ĉu ne surprize frapas la ideo, sona kaj litera parenceco de la vortoj "sánitas (saneco)," "sánctitas (sankteco)," pluformaĵoj de la latinaj "sanus, -a, -um" kaj "sanctus, -a, -um"?

Pripensu krome la instruon de la verbo "*respondi*", kiu devenas de la latina "spóndere (solene, ĵure promesi)" kaj per la prefikso re- esprimas la ideon,

ke la ricevanto de la promeso, same sincere, pravigu la esperon de la promesinto.

Kion diras al ni la vorto "imago", samlitera kaj samsignifa en Esperanto kaj latino? Ĝia signifo estas "ágere in se (agi en si)", fari en si bildon de si aŭ de iu aŭ io. En la germana lingvo la rekta tradukaĵo de "imago" "Einbildung" havas malŝatan kromsencan, riproĉantan pro fanfaronemo aŭ aroganteco, ĉar tia bildo ebligas ja nur al la imaganto, dum aliaj personoj vidas baldaŭ lian (ŝian) veran karakteron aŭ fantazion.

Ĉu vi jam cerbumis pri la vortoj *historio* kaj *histologio*? Pri la nomoj Stalin kaj Molotow (ŝtalulo kaj martelo)?

Historio tuj klariĝas, se oni memoras, ke histologio estas la scienco pri la firmaj konsistaĵoj de la korpoj, la materio de la teksisto Naturo. En ambaŭ grekdevenaj esprimoj troviĝas la elemento "histos" (fibro). En la dua ĝi estas kombinita kun "logos" (verbo, kiu kondiĉas substantivon, kiu ĝin parolas). La unua estas kombinita kun "oraein" (vidi). Do, la historio vidas kaj vidigas la teksaĵon kaj ties erojn, la tavolojn, de la teksisto de la mondo. La mondo ja estas ankaŭ la sumo de la okazaĵoj sur la tero ek de ties komenciĝo. Kaj, ĉu la kromnomoj de la cititaj politikistoj, kiuj estas konataj nur jam pro ili, ne estas elokventaj programoj de agado? Elektante ilin la havantoj konsciis pri unu tasko de la homa lingvo, sciui, anonci kaj klarigi intencojn kaj karakterojn. Paraleloj estas la famaj nomoj *Sokrato* (estranta saĝeco) kaj *Demostenio* (bridanto de la popolo)! Ĉu ankaŭ ĉi tiuj antikvaj nomoj estas kaŝnomoj, nur trafaj priskriboj de elstaraj karakteroj? Ĉi tio ŝajnas facile pravigebla.

Tiel ni povas konstati, ke bedaŭrinde fundamentaj (jen!) esprimoj dum sia

ekzistado skeletigis kaj fariĝis fakesprimoj, perdintaj la vigligan odoron de la freŝeco. Kiam ili naskiĝis, ili servis al la vivo kaj faris ankaŭ la akceptantajn lingvojn saĝaj, spritaj, elegantaj, sekvantaj la naturan metodon de pliriĉigo. Ĝin imitis en kaj por sia Esperanto nia Majstro Zamenhof. IDO forlasis ĉi tiun prosperigan vojon de l' evoluado kaj minacis fariĝi nova lingvo nur de la scienco, sed ne la *dua* lingvo por *ĉiu*, la lingvo de la paco inter la diverslingvaj homoj, kiuj ŝatas sin- kaj homonimojn, por gajni ankaŭ per la lingvo tutmonda.

IDO ja fiaskis, sed ĝia harfendemo kaj transprenemo postefikas ankaŭ en niaj rangoj, ĉar decidiga influo de la popolamasoj plendinde mankas en nia movado; ĝi estas tro direktata de kleruloj, kiuj opinias, ke la Internacia Lingvo ne povas esti tro preciza kaj kiuj ne sufiĉe konscias sian plej altan taskon, per Esperanto, kreskanta per propraj siaj elementoj, klerigi la vastan publikon de mondo, precipe en aferoj de la tuta homaro. Ne imitante ekz. la procedadon de la altkvalita nacio de la *finnoj*, kiu *finne* nomas novajn ideojn kaj civilizaĵojn, ili tro rapidas, Esperante transskribi lernitajn esprimojn de antikvaj kaj modernaj lingvoj kaj tiel abundegigas nian vortaron, fermante la pardon al la nova epoko antaŭ la klerigemaj kaj klerigindaj amasoj de la popoloj. Ilin strange ne avertas la sorto de *Occidental*, por kleruloj pli facile komprenebla ol nia Esperanto. Ili ne pensas pri la homamasoj de la oriento, kiuj deziregas klerigi ĝuste per Esperanto. Kaj oni forgesas, ke ni esperantistoj estu prave fieraj kiel ŝtatanoj de Esperantujo.

Tial mi pledadas por la uzo de ĉiam Esperanto restanta Esperanto kaj proponis la laŭeble eviton kaj ŝanĝon de jenaj

esprimoj, kiujn mi trovis ankaŭ en la tre bona verko "*Aktualaj problemoj*" de nia profesoro Lapenna, por plifaciligi la komprenon de ĝia enhavo ankaŭ al nefakuloj kaj homoj kun ordinara klereco.

Koincido = kunenfalo (Germ. Zusammenfallen) kunokaziĝo, kuneniĝo; Kriterio = kritikebligo, -aĵo; Konkurencio = konkuro; nocio = komprenaĵo; ratifo = validigo (parlamentaj); formala = laŭforma; preskribo = kondiĉo; materiala = materia; centrifuga = decentra, decentrema; centripeta = alcentra, alcentrema; ekskluzive = neante, forferme (germ. ausschliesslich, preciza traduko!); inkluzivi = enfermi (germ. einschliessen, preciza traduko el la latino!) jesi; kurtuazo = korteganejo; klaŭzo = kondiĉo (kontrakta); damno = malutilo; aperte = malkaŝe; kapacito = kapablo (sufiĉa); konsilo = konsilantaro; nacio = rasanaro; internacia = interrasa.

Apud tiuj sciencaj, ja internaciaj vortoj, kies anstataŭigon mi konsilas, tuŝas agrable, ke s-ano Lapenna uzas tiel simplajn esprimojn kiel "starigi principon", "preni mezuro(j)n". Per ĉi tiuj li pravigas mian pledon por la ĉiam simpla, populara, tamen ade evoluanta Esperanto.

Do, ne doniĝas serioza hezitivo, ĉu nian Esperanton evoluigi laŭ idistaj gusto kaj praktiko aŭ konservi ĝin por sia rolo de la *dua* lingvo por *ĉiu* homo. Ambaŭ estas atentende. Niaj scincistoj *studadu* nian originan kaj nature riĉiĝintan vortrezoron, atentu la memstarecon de ĉiu elemento de Esperanto kaj ekĝoju pri la senfina kombinebleco per ili kaj verku ĉiam pli da porpopolaj verkoj sciencaj. *Esperanto estas sociaĵo*. Jen ilia tasko savonta Esperanton por ambaŭ roloj destinitaj al ĝi.

## Kelkaj Komentoj el UHA-Ĵurnalo

### Malamiko embuskas interne

Oni diras ke, kiuj plej timas la enpenetron de komunismo, estas la gvidantaro de kristanismo. Tamen, laŭ la aserto de W. Cambell, episkopo en Usono, la malamiko ne estas komunismo, sed ĝi troviĝas inter la kristanoj mem.

En iu anglikana kunveno, kiu okazis antaŭ ne longe en Krugersdorp, Sudafriko, Episkopo Cambell parolis: "Kio malhelpas la unueciĝon de kristanoj estas la nesufiĉa kredo ĉe la kristana gvidantaro. Ĝi estas minaco pli granda ol komunismo ekstera. Pli ol komunistoj kaj ateistoj, facilanimaj kristanoj estas danĝeraj elementoj. Por ili la preĝejo estas la neceso nur por la okazo de naskiĝo, geedziĝo, funebro, ktp."

Tio ĉi ĉio aludas, ke religio, tiel longe, kiel ĝi ne vivas en la fundo de la homa koro, kaj restas nur supraĵe en ritoj kaj sociaj rutinoj, estas preskaŭ senseca, kaj plie, ke se religio estas indiferenta pri la liberigo de la popolo je ĉiuj vivkatenoj, por kio komunistoj senĉese klopodas per ĉia sistemigo, ĝi frontas al la konstanta minaco flanke de komunismo.

Hodiaŭ, la plej grava problemoj estas kiamaniere faciligi la ekonomian vivon de l' popolo. Aparte de la demando, ĉu la rimedo estas ĝusta aŭ ne, oni povus diri, ke komunistoj energie batalas por la solvo de tiu problemoj, dum la eklezio por ĉiam ankoraŭ crakolas, ke la malfacila vivo de iu venas de la manko de kredo. Estas do nature, ke la popolo pli kaj pli forlasis religion, kaj el tio rezultas, ke nur tiuj, kiuj deziras agi

dece en la socio, utiligas religion nur okaze de funebro, geedziĝo, nasko kaj similaj.

La malamiko ne venas sentaktike. Se ĝi venas, ĝi venas, ĉar estas ia manko aŭ malforta loko ĉe nia flanko. Tial se oni timas, ke religio estas sub la minaco de komunismo, oni bezonas, antaŭ ol malami kaj timi la malamikon, introspekti pri si mem, konsiderante kia estas ilia religio kaj kiel ĝin reformi. Nur post tio sekvas taŭgaj rimedoj kontraŭ la malamiko. En tiu ĉi senco la vortoj de Episkopo Cambell estas la ĝusta averto ne sole al anglikananoj, sed ankaŭ al ĉiuj aliaj religiuloj.

Trad. S. Takahaŝi

### Rasa problemoj kaj religio

La problemoj pri negroj en Usono, kiu estas kvazaŭ barometro por mezuri la konsciencon de usonanoj, ŝajnas esti pli kaj pli solvata.

Diversaj povas esti la faktoroj, kiuj kontribuas al la solvo. Unue, la negroj estas plene asimilitaj kiel usonanoj en la kulturo de la lingvo ĝis manĝo. Due, la "egalrajto," kiu ĝis antaŭ 20 jaroj estis surpapera florumo en la Konstitucio, estas pli kaj pli fidele aplikita de la Plej Supera Tribunalo tiel, ke ankaŭ ŝtataj superaj juĝejoj tendencis forigi distingon inter negroj kaj blankuloj. Trie, negroj, uzante sian elekto-rajton, ne ŝparis siajn klopodojn por plibonigi la sociajn kondiĉojn por si.

Krom la supre-diritaj faktoroj, la decida estis la rolo de religio: Jam ne parolante pri protestantoj, la eklezioj Katolika kaj Metodista ankaŭ bone batal-

adis por efektiviĝi la "egalecon". Oni raportas, ke katolika episkopo en North Carolina sukcesis fermigi la "preĝejon por negroj," kaj ĉeestigi ilin en la sama preĝejo, kie blankuloj preĝas. Alia episkopo en Virginia, kie la antaŭjuĝo estas tradicie intensa, persiste laboris por la sama celo kaj sukcesis. La Metodista eklezio faris regulon, ke oni okazigos la jarkunvenon en neniu urbo, kie la rasa antaŭjuĝo restas en la socia kutimo. Kompreneble tia decido renkontas reziston flanke de blankuloj en la komenco, sed ĝi baldaŭ estas rekonita.

Alia grava faktoro, kiu servis nuligi la rasan distingon, estas la "armeo". Prezidanto Truman iam malorganizigis negro-taĉmentojn kaj enmiksitis la negrojn en la armeojn, tiel ke ne malmultaj "blankaj oficiroj" estis malkontentaj, ĉar ili devis foje servi sub negroj. Al tiaj Truman diris, "Se tio malplaĉas al vi, ekŝiĝu." Ekŝiĝis tamen neniu krom unu tra la armeoj, landa, mara, kaj aera.

Ankaŭ en la eduka sistemo pli kaj pli malaperas la antaŭjuĝoj pri la raso. Precipe de kiam la Plej Supera Tribunalo decidis, ke se oni ne permesas al negroj eniri en la universitatojn por blankuloj aŭ fondi apartajn universitatojn por ili, la rasa problemo estas neniam forigebla, negroj estas pli kaj pli absorbataj en la universitatojn por blankuloj.

Krome, negroj estis "la dungitoj plej lastaj sed la maldungitoj unuaj" kaj estis devigataj fari pli pezan laboron por malpli multa salajro. Tamen ankaŭ tia kondiĉo estas pli kaj pli bonigata.

Blankuloj en sia kruda sento ankoraŭ ŝajnas havi malŝaton kontraŭ negroj. Malgraŭ tio, la homa racio, bonvolo kaj religikredo tiamaniere pli kaj pli liberigas la homojn de ĉiaj antaŭjuĝoj. Tio ĵetas lumon sur la problemon de la homaro.

Tagiĝo ne venas kiel eklumas elektro-lampo; ĝi tamen venas iom post iom, kaj certe venas. Nur sufiĉas, ke ni, homoj, malfermos la fenestron de koro... Por amo kaj pacienco! Trad. J. Nagai

### Mistraktado al Kokinoj

La Societo por malhelpo de Kruelaĵo kontraŭ Animaloj en Anglujo komencis lastatempe la movadon por leĝe malpermesi la *bateri*-metodon por ekspluati kokinojn je ovo-demeto. La *bateri*-metodon oni jam antaŭ longe malpermesis en Danujo "kiel unu el kruelaĵoj kontraŭ animaloj." Ĝi estas jena:

Oni enmetas kokinon en malvastan bredkeston kies formato estas proksimuma kun iom granda biŝkvita skatolo, kaj en kiu la kokino povas moviĝeti sed neniel povas sin turni. Ŝi estas nutrata regule kaj aŭtomate. Oni ĵetas al ŝi elektran lumon dum 14-16 horoj por akceli la ovaraskon. Tiamaniere oni akiras eksterordinare multajn ovojn de la kokino.

La Societo insistas: "Eĉ birdo ne estu traktata tiel kruele kun tia nenatura vivado en tia malvasta loko. La kokino estas nenio alia ol perfortita ovo-produktilo." Aliflanke, la Ministrejo de Agrikulturo opinias: "La vivo de kokino en la kesto devas esti agrabla kaj komforta. Se ne, ĝi ne demetus tiom multajn ovojn. Sur kampara kokejo kaj en amasa vivado ŝi certe estus turmentata de malvarmega vento, kaj turmentata de atakemaj virkokoĵoj." Tamen, por diri la veron, la Ministrejo bonvenigas la *bateri*-sistemon pro tio, ke ĝia malpermeso kaŭzus malpliigon de produkto je 150 milionoj da ovojn en jaro.

\*

La suprecititan rakonton informas "Radio Press". Nu, pripensu, kiel estus

### NI LA PACON ĜUOS...

Bebel Sørensen  
(Danujo)

Kun doloro en la koro  
pensojn mi ne ŝparas  
pri ĉi tiu fi-laboro,  
kiun homoj faras.

Jes, la homoj per atomoj  
kun frenez' batalis;  
kvazaŭ tro maturaj pomoj  
bomboj teren falis.

Tiu faro de l' homaro  
estas aĉa, krima —  
Kial do milit-preparo  
kun mizer' senlima?

Milionoj per kanonoj  
mondon ja detruos.  
Malgraŭ tiuj ĉi friponoj  
ni la pacon ĝuos.

Ĉiam morto aŭ perforto  
estas sensacioj.  
Pli pacama estus sporto  
inter la nacioj —

Ne militon, sed kariton  
ĉiam ni bezonas.  
Tuj agadon, ne heziton  
tial mi proponas.

Sur la tero — ni en vero  
bone vivi povus.  
Realigu la espero,  
ke ni solvon trovus.

Karaj fratoj — kamaradoj  
jen deziro flama:  
Ne plu estu hom-buĉadoj  
sed la pac' ĉiama!

se oni aplikus la saman sistemo al la homa mondo! La homo estas enmetita en ia sistemo, en kiu li povas moviĝeti sed ne estas permesata ŝanĝi la direkton. Periode kaj meĥanike lin nutras "salajro." Kaj ĉiu-jare aŭ 1 1/2 jare lian laboron instigas la "altigo de salajro." Tiamaniere li altigas sian laborefikon. Tiun ĉi alegorion oni ne rajtas riproĉi, ĉar la homa laborefiko en la nuna mondo estas altigata ĝuste tiamaniere. Plie, oni estas pli kontenta esti enfermita en tia sistemo, ol esti maltrankvila pro senlaboreco.

\*

Tio ĉi prezentas al ni la problemon: kio estas kruelo, kaj kio estas doloro? Kio ŝajnas esti komforta al iuj, tio al aliaj ne povas esti komforta, nek libera. precipe kiam tio estas altrudita; kred-eble, perfortita estas kruele. Kiom ajn dolora ŝajnus laboro en ĝia eksteraĵo, ĝi ne estas doloriga, kaj eĉ plezuriga por la laboranto mem, se li laboras mem-vole.

Tial, oni povas diri, ke por igi la homon libere altigi la laborefikon, antaŭ ĉio estas necese havigi al li la volon plezure kaj volonte labori. Tamen, la manieroj laŭ kiuj oni povas havigi al si volon labori plezure, estas tre diversaj laŭ la persono, la tempo kaj la cirkons-tancoj.

Sed, se oni pripensas pli profunde, oni povas rimarki ke ĉiuj homoj havas la komunan elementon por havi la volon labori plezure. Tiu elemento ja estas la religia vivpercepto, dank' al kiu la homo trovas plezuron en laboro kaj en tio eltrovas signifon de la vivo.

Trad. J. Umeda



## Japana Kulturo

### Artoj de l' primitivaj japanoj

#### Sango Uno

Ĉiuj gentoj en la primitiva tempo progresis laŭ komuna kultura procezo, sed naskiĝintaj kulturoj diferenciĝis unu de aliaj pro la klimatoj kaj iliaj natur-spiritoj. La protojapanoj ankaŭ evoluadis en la sama procezo kaj kreis sian bele florantan kulturon karakterizati. Nu, ni rigardu ĉi tie la japanan originan arton laŭ la tempo.

La argilpupo de la 1-a bildo estas restaĵo de la dua periodo de la Neolita Epoko, la Unuaj Tagoj de la Prajapanujo. Laŭ la arĥeologio ĝi apartenas al la grupo de Kamegaoka-stilaj argilaĵoj, kiuj produktiĝis en la komenco de l' posta periodo de *jomon*\*-epoko (ĉ. 2000-1000 A.K.). (elfosaĵo en Akita Gubernio)

Tiu ĉi argilpupo estas virina figuro. Se mi nomus ĝin belulino, la legantoj certe ridus. Tamen, atente rigardu la legantoj! Kiel trankvila, brava kaj majesta ĝi aspektas kvazaŭ heroo! De kie devenas tia aplombo? Eble oni facile kapjesus, se mi dirus ke ĝi estas ne homa, sed Sankta figuro. Sed, kiam oni rekonas ke ĝi estas produktaĵo de primitivaj japanoj, kiuj loĝis en la nordorientaj provincoj, kaj iel prezentas realan vivon de tiu tempo, tiam oni ne povas sin deteni de forta miro.

Ĉi tiuj ŝtonepokaj homoj tenis sian vivon ĉefe per ĉasado kaj fiŝado. La lando estis plene vualita de praarbaroj. La naturo estis tute alispeca ol tiu, kiun oni nun vidas sur montoj kronataj de pinoj aŭ sur herbozaj kampoj en la moderna Japanujo. Nigre verdaj, grandiozaj, virgaj arbaroj, kovrantaj la tutan teron, rekte provokis la maron; riveroj



senbride furiozis; la maro muĝe ĵetis la ŝaŭmantajn ondojn kontraŭ la tero. En tiuj misteroj de la naturo la homoj estis elmetataj sub la konstanta minaco de sovaĝaj bestoj. Ilia ĉiutago estis ja terura je malsato kaj kataklismoj.

Tiu ĉi bildo montras mirinde trankvilan figuron kontraŭ tia naturo, kaj samtempe la homan ĝojon de "tagiĝo". Homoj sendube komencis enradikiĝi en la teron de Japanujo. El la desegnaĵo sur la pupo oni povas observi kuraĝan spiriton de tiamaj insulanoj nutritan dum la batalado kontraŭ la naturo, homan memfidon akiritan per la venkado al la naturo kaj animaloj, kaj aliflanke ilian piemon al la naturo, kiam oni konsideras ke la desegnaĵo estas esprimo de preĝo. Ĉion ĉi tion oni plibone komprenos, se oni vidos multajn aliajn argilaĵojn samtimpajn.

\* Tiutempaj argilaĵoj estas arĥeologie konataj per la nomo de *jomon*-tipo pro la ŝnurlinia desegno sur ili.


*Jomon*-tipaj argilaĵoj estas distingitaj inter argilaĵoj de la mondo ankaŭ el belarta vidpunkto. Argilaĵoj en diversaj landoj de Eŭropo, Egiptujo kaj Mediteraneaj provincoj, Sudameriko kaj Ĉinujo montras siavice proprajn karakterojn kaj belecojn, tamen la *jomon*-tipaj de Japanujo estas la plej rimarkindaj. Ĉi tiuj prosperis fore en tiu izolita orienta insulo kun tia originaleco, ke oni trovas eĉ similan nek en Azia kontinento, nek en Korea duoninsulo, nek en Siberio.

La stilo estas flua; en ĝi penetras libera forta ritmo. La moderiga arto de tuŝado kaj la plastiko estas ekstreme akcentitaj; la mirinda koncepto pri interspaco estas precipe nekomparebla. Tiu ĉi karakteriza koncepto pri interspaco fariĝis unu el ĉefaj elementoj de tradiciaj japanaj belartoj.

Kiamaniere atingis tiel alte la kulturo de ĉi tiuj fruaj tagoj? Mi konsideras ke preskaŭ ĉiuj argilaĵoj inklude pupojn eble estas destinitaj ne por ĉiutagaj vivbezonaĵoj, sed por diserviloj. La signifo de l' supredirita desegnaĵo sendube ne estas simpla ornamo, sed magiaj vortoj, kiujn oni povas konsideri la honestan manifestiĝon de homaj deziroj. La aktualaj deziroj ĉi tie rekte kunligiĝas kun Dio. Kaj ĝuste en tio troviĝas la belo, kiu forte frapas al ni la koron. Ĝi, la desegnaĵo, aliflanke povas esti esprimo de l' poeta sentimento por la grandiozaj praarbaroj kaj montaroj!

La 2-a bildo estas unu ekzemplo de *haniwa*\* (argila figuro), kiu montras kapon de knabino. Ĝi estis elfosita en Nara distrikto, tiutempa kultur-centro

Unu speco de *jomon*-argilaĵo





(200-500 P. K.).

Kiel serenaj vizaĝesprimcoj ĝi havas! Tiutempe multaj ĉinoj kaj koreoj jam sinsekve venis trans maron al Japanujo kaj naciigis. Ili inspiris al japanoj kaj tute novan atmosferon. Konsekvence la kulturo estis pli brile progresanta; heredinte la plenflorantan *jajoi*-tipan\*\* kulturon (antaŭ kaj post Kristo), la epoko jam transpaŝis en la novan.

La terkulturo disvolviĝis, konstruaj laboroj ankaŭ vigliĝis. La virgaj arbaroj transformiĝis en vastajn ebenaĵojn. Matene oni aŭdis kokojn kokeriki; tage en kampoj oni vidis dombestojn labori. Homoj manĝis grenojn kiel ĉefajn nutrarojn, kaj kolektiĝante ili formis grupojn kaj vilaĝojn.

Sur la vizaĝo de tiu ĉi knabino brilas milda lumo de freŝa vivo, kiel la junaj herboj burĝonantaj en frua printempo. Aspektas, kvazaŭ ŝi ekkantus sian naŭvan amanton. La profilo kun granda volumeno kiu aludas progresintan cerbon, estas vere nobla kaj eleganta.

\* Tiamaj homoj kutimis runde aranĝi argilajn figurojn sur la surfaco de tomba teramaso. Ili reprezentas homojn, dombestojn, instrumentojn ktp., kiuj servis al la mortinto.

\*\* Tiutempaj argilaĵoj estas arĥeologie konataj per la nomo de *jajoi*-tipo pro tio, ke iliaj ekzemploj estis unufoje trovitaj en Jajoi, parto de Tokio. La karakteriza desegno sur *jajoi*-argilaĵoj konsistas el rektaj linioj; ĝi estas simpla kaj neta kontraste al tiu de *jomon*-tipo.

La 3-a bildo ankaŭ estas unu el *haniwa*, produktita en la sama periodo kiel la supra, sed prezentas viran figuron. Ĝi estis trovita en Gunma Gubernio, nordoriente izolita de la tiamaj kulturcentro. Kiel vi vidas, la falko, sidanta sur la dekstra brako, portas sonorileton sur ĉe sia postaĵo. Falkoĉasado por la tiamuloj jam estis unu el la amuzadoj. La armita figuro de juna nobelo kiel ĉasanto montras en sia simpleco emocion de la ĝojplena vivo. Tio tute akordas kun la spirito de *Man'jo*-poemaro. Kredeble en tiu antaŭ-kaj posthistoria epoko oni tiel libere versadis, kiel fonto ŝprucas el la roko. La ideografia skribado estis pli kaj pli aplikata. Oni ĝoje dancis kaj kantis per harmoniaj poezioj. Mi povus diri ke tiutempa vivĝojo estis senŝanĝe revivigita en *haniwa*.


Ĉu la vivĝojo estis tiel forta ke ĝi forviŝis la malluman ombon de la morto? Jes, oni vidas eĉ sur *haniwa*, starigitaj sur tomboj, kvazaŭ gajajn vivantajn homojn kun serena luma vizaĝ-

esprimo.

Ĉe ili oni ne povas trovi tiajn severajn trajtojn, kiajn havas la diserviloj aŭ argilpupoj elfositaj el ĉinaj maŭzoleoj kaj koreaj pratempaj tomboj. Sur ilia optimisma mieno brilas homa denaska mildeco; kaj tio aludas ke ili estas kreitaj inspire kaj improvize. Kvankam ili unuflanke montras tian senzorgecon, tamen aliflanke, ili surprizas nin per la mirinde akra kaj delikata esprimo, kiu havas iliaj okuloj kave eltranĉitaj. Vere ĉiuj eksentas vidi en tiuj okuloj la "japanajn fizionomiojn".

La mistere bela sensualisma priskribo pri tiuj okuloj estas elemento de japanaj belartoj. Kiuj estas kortuŝitaj de la mirinda koncepto pri interspaco montrita en *jomon*-argilaĵoj, ĉi tie denove freŝe impresiĝas de japana speciala talento pri la interspaco.

La 4-a bildo montras simian figuron. La simia argil-figuro estas unu sola ekzemplo eltrovita, dum ĉevala, dombirda, akvobirda, doma, ŝipa kaj aliaj



figuroj havas ekzemplerojn. Ĝi estas trovita en Ibaragi Gubernio, malproksima for de la centro, sed ĝi estas altnivela skulptaĵo. Ĝi prezentas perfektecon elstare superan super grupoj da aliaj argil-figuroj, en kiuj oni vidas naŭvan sensperitecon de fruaj tagoj, kaj el kiuj preskaŭ ĉiuj estas faritaj pentraĵe, ekzemple; laŭ fronta vidiĝo aŭ en rekta pozo nur kun iom da kliniĝo.

Speciale, la esprimo de ĝiaj okuloj estas inda je admiro. Kvankam nevidebla en la bildo, la postsigno de simiido surdorse portita restas sur la argilaĵo. La simio en la bildo estas patrino. Kia delikata funkcio de la okuloj de la patrino, kiu singarde prizorgas sian idon ĉe sia surpriziĝo! Nun oni vere kontaktiĝas kun la simplaj sed delikataj sentimentoj de tiutempuloj kaj simpatie emociiĝas.

La akra belo kaŝita sub simpla aspekto, la harmoniiga arto inter simpligo kaj akcentado, abstrakteco kaj realeco, kaj varieco kaj unueco, kaj la koncepto pri akra tuŝado kaj interspaco, ĉio ĉi tio ja estas la spino de la japanaj belartoj.

Trad. La Red.



## Por pacaj Movadoj

### Kio estas la movado de Monda Frateco?

La 5-an de feb., d-ro Everett R. Clinchy, prezidanto de MONDA FRATECO, d-ro William A. Shimer, direktoro de ĝia Pacifik-Azia distrikto, kaj iliaj edzinoj akompanate de prof. Jung de Dooŝiŝa Universitato, Kioto, vizitis la centron de Oomoto. Ambaŭ doktoroj favoris oomotanojn ĉe la centro per unu-hora parolado kun interpreto. Post tio la gastoj interparolis kun prezidanto kaj aliaj estraranoj de UHA pri la agadoj de UHA kaj diversaj porpacaj aferoj. Je la 9-a vespere la gastoj kun kontento foriris de la centro. Ni resume prezentas la movadon de *Monda Frateco* ĉi-sube:

La organizo de *Monda Frateco* estis lanĉita ĉe UNESKO-Domo en Parizo. 1954 markas la 26-an jaron de la movado.

La programo de *Monda Frateco* provizas grundon de komuna kunveno, sur kiu ĉiuj viroj kaj virinoj povas kunveni kaj kunlabori por antaŭenigi justecon, interkompreniĝon kaj kunagadon.

*Monda Frateco* celas Unu Mondon, nedivideble kunligitan per libereco kaj justeco por ĉiuj. Ĝi ne prenas politikan pozicion, nek lasas sin uzi leĝdonajn premojn. Ĝi estas *instrua* organizo.

*Monda Frateco* estas *propravola*, *ne-registara* asocio de individuoj, kiuj kredas *spiritan interpreton de la universo*, kaj kiuj ricevas sian inspiron de tio.

*Monda Frateco* klopodas por kunlaborado inter ĉiuj, kiuj rekonas la

moralan leĝon. Ĝi ne kompromitas religiajn doktrinojn, nek serĉas komunan denominatoron de kredo, nek okupiĝas en komuna adoro, nek deduktas ke unu religio estas tiel bona kiel alia.

*Monda Frateco* serĉas por membroj de ĉiuj nacioj, rasoj kaj religioj la samajn respekton kaj rajtojn, kiujn ĉiu individuo deziras havi por si mem.

Per esplorado *Monda Frateco* akiras faktojn pri diferencoj kaj streĉoj. Per edukado ĝi informas al viroj, virinoj kaj infanoj ĉi tiujn faktojn.

Kvin naciaj kaj lokaj komisionoj, konsistantaj el neoficialaj reprezentantoj de diversaj organizoj, laboras per:

[1] Lernejoj, Kolegioj, Universitatoj, [2] Preĝejoj, Temploj, Sinagogoj, [3] Sociaj Grupoj, [4] Laboristaj Unuiĝoj, [5] Periloj de Komunikaj Presaĵoj, Radio, Televido, Filmoj.

Ĉefoficejoj de *Monda Frateco* estas en Novjorko, Ĝenevo, Parizo, Romo, Luksemburgo, Bruselo, Amsterdamo, Kopenhago, Frankfurto, Toronto, Honolulu, Tokio, Manilo... kaj rapide multiĝantaj.

*Monda Frateco* estas subtenata tute per financaj kontribuajtoj de individuoj kaj korporacioj.

Donacoj de ĉiuj naciaj monoj estas bonvenigataj. Sendu ilin al la plej proksima el la supre montritaj oficejoj.

### La 2-a Azia Kongreso por Mondfederalismo

Por antaŭenigi speciale en Azio la movadon de Mondfederacia Registaro, la II-a AZIA KONGRESO DE MONDFEDERALISTOJ estas okazigota 1-5 nov., 1954 en Tokio, la urbo de Azio, sub la komuna aranĝo de la Unuiĝo por Modfederacia Registaro (Membro-organizo de la Mondmovado por Mondfederacia Registaro) kaj la Japana

Parlamentara Asocio por Mondfederacio.

La VI-a Kongreso de la Mondfederalista Mondmovado, okazigota en la komenco de sep. de tiu ĉi jaro en Eŭropo, certe proponos la rezoluciojn kaj rekomendojn adoptitajn lastjare en Kopenhago de la kolektiva konferenco de la WMWFG kaj la WAPWG. Tial la Tokia Kongreso en nov. havos la taskon disvastigi en Azio la rezultojn de la VI-a, kaj eltrovi vojon kaj rimedojn por ili.

Post atenta studado, kiamaniere fari la Azian Kongreson grandefekta, la organizantoj decidis okazigi specialan kunvenon en majo kiel parton de la Novembra Kongreso. Tiu ĉi kunveno, kiun oni tiel planis konsiderante la taktikon kaj nuntempajn cirkonstancojn, estos de individuo el la ne-membroŝtatoj — ne-membroj de la Unuiĝintaj Nacioj. La kunveno studos la demandon de la universaleco de monpaca organizo. Estas kompreneble ke la demando estas komuna afero por ĉiuj nacioj. Tial en principo ne estas kialo, ke ĝi devas esti diskutata en kunveno, konsistanta nur el ne-membroj de UNO. Sed taktikaj kialoj estas multaj.

La kunveno plue studos la rekomendojn adoptitajn en Kopenhago rilate al la transformigo de UNO en Mondregistaron.

La maja kunveno konsistos el individuoj diverslandaj kiel jam dirite, sed tio ne malhelpas, ke la reprezentantoj kaj observantoj de oficialaj institucioj, inklude registarojn, ĝin ĉeestos, dum ili estos movataj de la idealo efektivigi Unu Mondon.

Post la Novembra Tokia Kongreso, mond-federalistoj en Kioto, Hiroŝima, Nagasaki kaj aliaj lokoj invitos la ĉeestintojn al siaj urboj.

Tute same kiel ĉe la 1-a Azia Kongreso, multaj membroj de UHA agados kiel gravaj aktivuloj. Cetere, ni Oomotanoj Esp-istoj nun firme kordecidus labori plej energie por ke la 2-a Kongreso rekonu Esperanton kiel almenaŭ unu el ĝiaj oficialaj lingvoj kaj ke ĝi nepre havu Esp-istan fakkunsidon. Por tio necesas, ke en ĝi partoprenu multaj eksterlandaj samideanoj kaj ke ili sin anoncu kiel eble plej frue. Ankaŭ tiuj, kiuj ne povas veturi al nia lando, povas tre efike helpi por efektivigo de ĉiuj direktaj projektoj, sendante al ĉi-suba adreso instigajn vortojn pri enkonduko de Esp-o al la mondfederacia movado. Ni petas al ĉiuj Esp-istaj federalistoj de la mondo ke ili ne ŝparu kunlaboron por sukcesigo de la 2a Azia Kongreso, kiu laŭ nia espero, estos historia okazo salte antaŭenpuŝi ambaŭ movadojn Esp-an kaj mondfederacian. Eksterlandaj samideanoj kiuj partoprenos la Kongreson, estos elkore bonvenigataj de la japanaj samideanoj ĝenerale kaj precipe de ni Oomotanoj, kiuj estas pretaj fari ĉion eblan por ilia agrabla restado en Japanujo.

La aranĝanto de la Tokia Kongreso, Sekai-Rempo Kensetu Domei (Unuiĝo por Mondfederacia Registaro, adreso: 1-6 Kanda Nishiki-machi, Chiyoda-ku, Tokio, Japanujo) estu tuŝita per amasaj entuziasmaj vortoj de diverslandaj samideanoj!

### Por nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitancas jene:

31. S-ino Edelma Palma, Jumin, Argentino: semoj de 7-specaj floroj

## Informoj de la Akademio de Esperanto

(N-ro 21 — oktobro 1953)

### ŜANĜO DE LA STATUTO

Por simpligi la procedon de la elektoj, unu frazo estas aldonita al art. 6 de la Statuto, traktanta pri la elektoj. Tiu artikolo nun havas la jenan enhavon (la aldonita frazo estas inter cithokoj):

ARTIKOLO 6. La membroj de la Akademio estas elektataj de la Akademio mem per absoluta plimulto de la voĉdonantoj. "Se devas okazi rebaloto, ĉar ne sufiĉe da kandidatoj ricevis la absolutan plimulton, en tiu rebaloto la relativa plimulto decidas." En okazo de nombro-egaleco de la voĉoj la Prezidanto havas decidan voĉon.

### PUBLIKA KUNVENO DE LA AKADEMIO DUM LA UNIVERSALA KONGRESO EN HAARLEM

En la kadro de la 39-a Universala Kongreso de Esperanto en Harlem denove okazos publika kunveno de la Akademio, en kiu la partoprenantoj havos la okazon direkti prilingvajn demandojn al la Akademio kaj libere diskuti pri lingvaj aferoj.

Proponoj por la tagordo de tiu kunveno povas jam nun esti sendataj al la adreso de la Akademio, sed ili devas atingi tiun adreson almenaŭ antaŭ la fino de Junio 1954. Ili povas esti duspecaj:

1. Oni povas formuli demandon pri iu lingva problemo rilata al Esperanto, pri kiu la Prezidanto kaj la aliaj ĉeestantaj Akademianoj donos sian opinion.

2. Oni povos mem enkonduki iun temon pri la lingvo Esperanto en la kunveno kaj defendi ĝin.

En ambaŭ okazoj povos sekvi liberaj diskutoj laŭ la disponebla tempo. Ĉar tiu tempo estos limigita, la Akademio fiksos antaŭe la tagordon kaj elektos por tio la plej gravajn demandojn kaj temojn, fiksante ilian sinsekvon en la pri-trakto.

En la tagordo aperos ekskluzive demandoj kaj temoj de ĉeestantaj personoj.

### PETO AL LA ELDONISTOJ DE ESPERANTAJ LIBROJ KAJ GAZETOJ

La eldonistoj de Esperantaj libroj kaj gazetoj estas petataj sendi al la Akademio almenaŭ unu ekzempleron de siaj novaj eldonoj.

Prezidanto *Ir. J. B. G. Isbrucker*

## Heroldo de Esperanto

Duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado en granda kaj bela formato

Eldonejo:

HEROLDO DE ESPERANTO

Harstenhoekweg 223. Scheveningen, Nederlando



## Literatura Rubriko

LA NORMANDAJ RAKONTOJ, noveloj de Guy de Maupassant. El franca lingvo tradukis Roland Dupuis. Grize-bruna tolbindo kun ora surpriso. Kun portretoj de la verkisto, tradukinto, 8 apartaj, tutpaĝaj bildoj pri Normandio (el kiuj 2 koloraj) kaj multaj ilustraĵoj intertekstaj. Eld. de Eldona Societo Esperanta (Fack 19071, Stockholm 19, Svedujo); formato: 22 x 15.5 cm.; 211 paĝoj; prezo: 15.—sv.kr. (afrankite).

Pro la luksa aspekto de la libro kaj la kara nomo de l' aŭtoro, Maupassant, mi plene kaptiĝis de ĝojego ĉe la momento de la kontaktiĝo kun "La Normandaj Rakontoj". Kaj la ĝojo ĉiam pli kreskis dum la legado, kaj mi bedaŭris kiam mi devis interrompi la legadon por ne tro malfruiĝi en la nokto.

La libro konsistas el 19 rakontoj, elektitaj el diversaj noveloj de Maupassant. Kiel la titolo montras, la medio de la rakontoj estas la lando de Normandio, idoj de l' malnova aventurista raso, kiu forveturis ŝipe por fondi reĝolandojn sur la bordoj de ĉiuj oceanoj. La aŭtoro kaj ankaŭ la tradukinto devenas de tiu ĉi provinco. Estas do nature, ke tiuj ĉi noveloj portas la kolorojn de la provinco. Kun la konata talento la aŭtoro reliefigas en ili la karakterizajn trajtojn de la "viking-idoj," iuzaj, diskutemaj, avaraj, obstinaj, kriemaj, atencemaj, kruelaj, ktp. ktp. Tamen, ni ial ne povas atribui tiajn karakterizaĵojn sole al la Normandaj provincoj. Neniel! Ju pli akre li elverŝas en la verkon sian fortan naŭzon al la homoj, des pli rekonas la legantoj

simpation ne nur al li, sed ankaŭ al la rolantoj en lia verko.

La ĉefaj trajtoj de liaj verkoj, kiuj ankoraŭ frapas la korojn de l' modernaj homoj, kuŝas en la originaleco de lia stilo kaj lia karaktero: kuraĝeco de penso, ŝtalaj nervoj ĝis senkoreco, akra observemo kaj ironio en priskribo. Li estas nomata la plej objektivisma eĉ el tiamaj membroj de la naturalista skolo. Efektive, en liaj noveloj oni preskaŭ ne povas percepti lian simpatiemon al liaj pritraktataj personoj. Nek troviĝas konsekvenco, nek moraleco. Emfaze dirite, nur odoras lia pesimismo. Kredeble mi iom troe menciis pri lia pesimismo, kvankam mi ne necese estas influata de la biografio, en kiuj oni pli ŝate pritraktas nur malsanan periodon de lia vivo. Pri lia spirita ekvilibro Henri Defontaine bone pledas en la enkonduko, kaj pri tio pruvas ankaŭ la portreto de l' aŭtoro prezentita en la libro. Sur lia fortika korpo kun plaĉa fizionomio mi neniel povas trovi ombrojn de l' malsanecaj malhelo kaj malgajo. Ĉio sentebla sur lia portreto estas forteco mem.

Lian fortecon oni povas vidi ankaŭ en tiu ĉi esp-a stilo, tre simpla, klara kaj facile esprimfluanta. Estas korekta, bonega traduko, neniom senhonoriga al la nomo de tiu ĉi brilanta franca novelisto. Ankaŭ la preso estas bela. Escepte tro oftajn nekutimajn uzojn de "estis-ata" kaj nur unu mispreson (sur p. 167 ... ĝorĝon devas esti gorĝon), nenia makulo estis rimarkebla.

La belaj bildoj aldonitaj por iom pli

vaste konigi la provincon Normandio servas por la gustoplena ĝuado de la legado.

Resume: Post la milito, la plej altvalora perlo por ĉiuj artamantaj esp-istoj, elfarita kunlabore de la tradukinto, la eldonejo kaj la presejo. Elkoran gratulon al ili kaj varman rekomendon al ĉiuj samideanoj. (Ŝ. Uemura)

PERSONAJ PRONOMOJ, gramatika studaĵo de Kenĵi Ossaka, honora membro de U. E. A.; eldonita de Katolika Asocio de Japanaj Esp-istoj (ĉe A. Matubara-Hatiro, Nanmatutyō 24, KISIWADA, Japanujo); formato: 17.5 × 24.5 cm.; 105 paĝoj; prezo: 6 anglaj ŝilingoj aŭ egalvaloro (enlanda: ¥ 250).

La nomo de la aŭtoro estas jam famekonata. En preskaŭ ĉiu numero de "La Revuo Orienta", organo de J. E. L., aperas serie liaj gramatikaj traktaĵoj aŭ interesaj prilingvaj legaĵoj. Tamen ne ĉiuj el liaj artikoloj estas eldonitaj en libroformo. Antaŭ 5 jaroj la eldonanto publikigis liajn traktaĵojn pri "numeraloj kaj nombro-vortoj", kaj "interjekcioj kaj onomatopeoj" en du libretoj.

La nuna libro estas kolekto de ankoraŭ nepublikigitaj studaĵoj, skribitaj tuta en esp. Kio karakterizas liajn studaĵojn estas la fideleco al kaj la kompetenteco pri Zamenhofaj modeloj kaj ankaŭ la preciza pravigo per lertaj parafrazoj. Foliumante la libron, oni trovas tian karakteron precipe en klarigoj pri specialaj uzoj de "si", al kiuj li dediĉas sufiĉe grandan parton de la libro. Ĉi-rilate li donas sian principon: "determino de pronomo laŭ la gradoj de intimeco." Kvankam ĝi estas iom teda pro sia komplikeco, komparebla, se oni dirus trogrande, kun la sistemo de la esp-a vorto-kunmeto verkita de Kalocsay en Plena Gramatiko, ĝi tamen estas tre

utila por sistemigi la komprenon pri iom malsimplaj okazoj de la refleksivo, eksplikite el diferencaj vidpunktoj de P. G.

Rilate al la difino pri la ĝenerala uzo de la refleksivo oni rimarkas la malsamecon inter la opinioj de Ossaka kaj Waringhien. Waringhien asertas en P. G. jene: "En esp-o, oni rigardas kiel triapersonajn la pronomojn *iu, tiu, ĉiu, neniu*, kiu, eĉ kiam ili reprezentas unuapersonan aŭ duapersonan terminon; oni do uzos SI kaj SIA en rilato kun ili: *vi, kiu per sia dekstra mano helpas la fidantojn.*" Kontraŭ tiu punkto Ossaka asertas: "Kvankam en tiu ĉi konstruo 'kiu' estas la subjekto de la subpropozicio, ĝi estas rigardata, kontraŭe al Rim. (20)\*, ne kiel de la personeco prezentata de la antaŭiranta pronomo, al kiu 'kiu' rilatas. *Montru vian mirindan favorkorecon, Vi, kiu per Via dekstra mano helpas la fidantojn kontraŭ la atakantoj.* (Ps 17-7, laŭ la Hachette'a eldono)." Kaj li plue diras: "'Per *Via dekstra mano*' en la ĉi-supre metita ekzemplo el la 'Psalmaro' troviĝas en la Biblio de la Londona eldono korektita al 'per *Sia dekstra mano*', verŝajne erarigita pro la angla-lingva kutimo. Tute senutila korekto, granda profano kontraŭ la Majstro!"

Por pravigi sin Ossaka mencias kiel jene: "Tiu ĉi uzo venas de la naturo de 'kiu'. Kiel ni jam rimarkigis en Rim.(2), 'iu'-serio de la Korelativoj estas adjektivaj partikuloj, kaj la antaŭiranta pronomo estas ofte subkomprenata post la 'kiu'. Ekz.: 'mi, kiu... = mi, *kiu mi*...' Komparu: 'Li lernas Sanskriton, *kiu lingvo* havas la plej malfacilan gramatikon el la jam ekzistantaj lingvoj.'"

Kiu el la ambaŭ opinioj estas korekta? La recenzanto atendas kritikojn de l' studemuloj el nia legantaro. Pri la malsameco de opinioj la recenzanto

menciu ankoraŭ unu punkton, t. e. pri posesivo kaj la artikolo. Post detalaj klarigoj pri tio Ossaka konklude konsilas: "Ne uzu la artikolon antaŭ posesivo en ordinara prozo; ĝia uzo tamen estas pravigebla nur (a) tiam, kiam oni volas speciale akcenti la posesivon, aŭ (b) kiam oni ĝin uzas pro neceso de ritmo en poezio". Sed la menciita P. G. staras kontraŭe, t. e. "la posesivoj ĉiam postulas la uzon de la artikolo" (ekz.: tiu libro estas *la mia*).

Ossaka volas sekvi, kiel ŝajnas al la recenzanto, fidele al la Zamenhofa lingvo-uzo pli ol al la kutimo de eŭropaj lingvoj. Ĉiokaze, la libro estas varme rekomendinda al ĉiuj esp-istoj, precipe al interesatoj pri la esp-a gramatiko.

En la libro troviĝas preseraroj, kvankam negravaj, tamen sufiĉe nombraj.

(N. E.)

\* "ĈIU EL NI", "MULTAJ EL VI" kaj similaj frazeroj, kiel Subjekto. Ĉar en tiaj frazeroj "ĉiu", "multaj", k.c. estas la subjektoj, oni kompreneble ilin traktas kiel la trian personon.



Okaze de la Novjara tago redakcianoj de OOMOTO vizitis nian redaktoron, s-ron Nakamura ĉe lia domo en Otsu apud Lago Biŭa por informiĝi pri lia sano. Li jam reakiris sufiĉan forton, kvankam li ankoraŭ devas kuŝi en la lito. Pere de ni, li esprimis apartan dankon al ĉiuj bonkoraj gesamideanoj, kiuj sendis al li leterojn, ilustr. p.k. kaj aliajn. En la lasta jaro li translokiĝis al sia naskiĝloko kaj lia nuna adreso estas: 217, Kamide-cho, Otsu-shi, Shiga-ken, Japanujo. La bildo montras: Staranta estas s-ro N. Esumi; maldekstre de tiu estas s-ro K. Osaki, redaktoro de "Kami-no-Kuni" (japenlingva periodaĵo de Oomoto).

## Antaŭ Haarlem Skotlando Vokas Vin!

INTERNACIA FERIA SEMAJNO

Julio 24a ĝis 30a 1954

en

NEWBATTLE ABBEY KOLEGIO

proksime al Edinburgh

Modernaj Komfortoj Bonaj Manĝaĵoj

Allcgaj ekskursoj kaj aliaj distraĵoj

Moderaj Kosto Nur 60 lokoj

Skribu tuj por detaloj al

La Sekretario, Edinburgh Esperanto

Society, 20 Glendevon Road,

Edinburgh 12, SKOTLANDO.

## Parolas la Legantaro

★ S-ro *Ernest G. Dodge*, Vaŝingtono, Usono

Mi hodiaŭ aĉetis internacian poŝtmandaton je \$ 1.50 por daŭrigi mian abonon de via ŝatata gazeto dum plua jaro. Mi volas gratuli la redaktantojn de OOMOTO pro ilia *korekta* uzo de pasivaj partecipoj, precipe en la prava uzo de "esti-ita" por montri simplan plenumiĝon de ago en pasinta tempo.

Hieraŭ (dimanĉon la 25-an de okt.) mi havis la plezuron prezenti mian prelegon titolitan "Oomoto—nova religio de frateco en Japanujo" ĉe la grupo de plenkreskuloj en la Unitariana Preĝejo. Ĉeestis inter 30 kaj 40 personoj, inkluzive kelkajn el ekster la preĝejanaro, kiuj venis pro persona invito aŭ pro la anonceto de tagjurnalo. La ĉeestantoj aŭskultis atente, kaj ŝajnis trovi la temon interesa. Ĉe la fino, mi montris la jubilean ventumilon, kiun vi bonvolis sendi al mi en la somero.

★ S-ro *Pal Balkanyi*, Budapeŝt, Hungarujo

Vi ne povas imagi, kian ĝojon kaŭzis al mi la alveno de via sendaĵo kune kun viaj revukajeroj. Interese estas ke du tagojn pli frue mi sonĝis ke mi ricevis kajerojn de OOMOTO. Kvazaŭ naskiĝtaga donaco estis por mi post pli ol dek jaroj la sciigo kaj amplenaj vortoj de la malproksimaj japanaj samideanoj! Kore mi rememoras, kiam mi regule ricevis vian gazeton kaj korespondis kun vi, kiam mi pasigis kune la tempon en Locarno kun s-ro K. Niŝimura, kiu loĝis en la sama ĉambro kun mi antaŭ kvaronjarcento. Se eble li rememoras min ankoraŭ, transdonu miajn plej korajn salutojn. Ankaŭ malfruante, sed neniam

malfrue mi sendas bondezirojn por la florado de via por-ama, por-harmonia, por-paca laborego, por Oomoto, kiu havis jubileon lastjare. Sed la laboro por interkompreniĝo, por solidara kunlaboro, por amikiĝo inter divers-specaj homoj daŭras ĉiam. Beno estu sur ĉia via laboro, precipe nun, kiam la tuta mondo kaj la tuta homaro tiom bezonas pacon kaj amikan kunlaboron! Mi bedaŭras ke Oomoto aŭ UHA ankoraŭ ne havas almenaŭ unu reprezentanton en la Pac-Mondkonsilantaro, kiu havis nun kunsidon en Budapeŝt kaj akceptis rezoluciojn por nepre pritrakti ĉiujn nesolvitajn demandojn por konservi pacon kaj por tiu celo alvokas kunlabori ĉiujn organizojn, fortojn, kiuj ankoraŭ ne enestas en la Konsilantaro. Oni alvokis pliintensigi la internacian solidaran kunlaboron, la interŝanĝon de kulturvaloroj, libroj, reciprokajn vizitojn, kongresojn, ktp., ĉar ili — kiel sovjeta verkistino deklaris — servas al amikiĝo kaj reciproka estimo de la nacioj, al sukcesa kunlaboro, al paco, por kiu oni devas uzi ĉiun rimedon. Oni kreu harmonion, pacan kunvivon, amikan atmosferon, fidon, entute eblecon de PACO! Ĉu do ne devus tiun laboron kunhelpi viaj revuo, organizo? Enestas ja divers-specaj homoj, diversopiniaj, ankaŭ de diversaj eklezioj, ĉeestis multaj el orientaj popoloj, aziaj, afrikaj inter ili japanoj — prof. Ikuo Ojama! ktp. Nur vi mankis! Aliĝu tuj! Skribu pri tio al ili!

Ĉeestis 25 eklezianoj, parolis kat. episkopo; 4 landajn packomitatojn reprezentis diversreligiaj pastroj!

★ S-ro *Wong Ling Kai*, Hong Kong

Kun granda plezuro mi tralegis viajn gazetojn, kiuj estas eldonitaj tute esperant-lingve kun bonegaj stilo kaj enhavo. Mi komprenas, ke Ees.-movado estas treege vigla kaj progresanta en Japanujo. Kaj la eldono de via organo OOMOTO montras la plej grandan brilecon de nia sankta afero en via ŝatata lando.

Via agado por homaro kaj internacia paco estas treege admirinda! Mi volas esprimi al vi mian plej varman respekton pro via alt-idea afero, kaj samtempe mi deziras, ke via afero ĉiam

iras kun granda progreso kaj sukceso.


★ S-ro *Helios Tato*, Montevideo, Urugvajo

Kun profunda dankemo kaj ĝojo mi sciigas al vi bonstatan alvenon, en miajn manojn, de via bela manpentrita ventumilo. Tuŝis mian koron via delikata ĝentileco! Ĉi tiu ĉarma artaĵo plaĉas al mi treege kaj zorge mi konservos ĝin, kiel veran juvelon. Aktuale mi montras la ventumilon al ĉiuj miaj familianoj kaj amikoj. Senescepte ĉiuj, kiuj ĝin rigardis, manifestas plezuregan admiron. Sincerajn gratulojn al la aŭtoro!

## Malbona herbo froston ne timas

Jes. Sed la semojn de tia-specaj herboj, la plej ordinariaj, ĉie troveblaj en via loko, aŭ bulbojn, aŭ tuberojn, ni ĝuste bezonas por nia INTERNACIA TERENO, kiun ni intencas fondi en la BOTANIKA ĜARDENO de OOMOTO, Kameoka.

Ankaŭ porcion da kulturebla *terro* kun iom detala klarigo (ekz. El kia tero, en kiu vegetis kia legomo, aŭ greno, aŭ taŭga por kia legomo aŭ por kia greno ktp. ktp.) ni bezonas kolekti por la AGRIKULTURA DEPARTEMENTO de nia Organizo, Kameoka.



Al ĉiuj, kiuj bonvolus sendi al ni en koverto aŭ pako unu aŭ ambaŭ el la supre-diritaj, ni elkore dankas, kaj volonte rekompencos ilin per *ilia* abonigo aŭ pluigo de ilia abono, al nia gazeto OOMOTO dum la tempo, kiun ili mem proponas al ni en konsidero pri siaj bezonataj iomaj *laboro* kaj elspezo.

Bonvolu tuj sendi al: Redakcio de OOMOTO

Kameoka, Kioto, Japanujo

## El Notlibro Esperantista

*Teruo Mikami*

### 1.

En Deklaracio pri Homaranismo, d-ro Zamenhof skribas:

Mi konscias, ke la esenco de la veraj religiaj ordonoj kuŝas en la koro de ĉiu homo sub la formo de konscienco, kaj ke la ĉefa por ĉiuj homoj deviga principo de tiuj ordonoj estas: *agu<sup>①</sup> kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi*: Ĉion alian en la religio mi rigardas kiel aldonojn, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksate kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn, kiuj estas starigitaj de homoj kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de nia volo. (Originala Verkaro, p. 342)

Pri la principo: *agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi*, d-ro Zamenhof komentas jene:

Hillel diris al unu idolano: "La tuta esenco de nia religio estas la leĝo: <agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi>; ĉio alia estas komentarioj." (O. V., p. 331)

La saman principon donas ankaŭ Jesuo Kristo:

Ĉion ajn, kion vi deziras, ke la homoj faru al vi, vi ankaŭ faru al ili.  
— Mateo 7, 12.

Pri tiu ĉi agprincipo oni klarigas kiel jene en "The Interpreter's Bible" (Vol. VII):

La negativa formo de la Ora Regulo estas vaste atestebla en Judaismo. Unu formulon de ĝi oni atribuas al Hillel, la plej granda el unua-jarcentaj rabenoj: Kio malplaĉas al vi, tion vi ne faru al via najbaro; ĉi tio estas la tuta Tora<sup>②</sup>, ĉio alia estas komentoj.

Kaj aparte pri la Ora Regulo oni ankoraŭ klarigas jene:

① Kursivigo mia

② Pri Tora la japanoj legu p. 301 de la Revuo Orienta, 1953

Dudek jarojn antaŭ Kristo, iu nehebreo moke demandis al la rabenoj Shammai kaj Hillel, ĉu ili povus instrui al li la tutan leĝon dum li staras sur unu piedo. Shammai en granda kolero ordonis lin for; Hillel respondis: Ne faru al aliaj tion, kion vi ne volus, ke aliaj faru al vi." Tiel Hillel instruis kaj praktikis la leĝon, kaj la viro fariĝis lia disĉiplo. Tio ĉi ne estas nova regulo. Lao-zo, Konfucio, Platono kaj la Malnova Testamento, ĉiuj instruis ĝin aŭ en pozitiva, aŭ en negativa formo.

Nu, la vortojn, kiuj rilatas al la Konfucia maksimumo mi elcitos ĉi-sube el "Rongo," Biblio de Konfuciismo. Mian esp-an tradukon antaŭiras la ĉina originalo, kaj ankaŭ la japanigita teksto inter krampoj, parte por la konveno de la japanaj legantoj kaj parte por la eksterlandaj samideanoj, por ke ili vidu kiaj aspektas la ĉinaj kaj japanaj literoj.

El Kajero N-ro 5

子貢曰、我不欲人之加諸我也、吾亦欲無加諸人、

子曰、賜也非爾所及也、

(子貢曰く、我人のこれを我に加ふるを欲せざることは、吾も亦これを人に加ふるなからむことを欲す。子曰く、賜よ、爾(汝)の及ぶところに非ざるなり。)

Zu-gung diris, "Kion mi ne deziras, ke aliaj faru al mi, mi ankaŭ deziras ne fari al aliaj." La Majstro diris, "Cu<sup>①</sup>, tio ne estas atingebla por vi."

El Kajero N-ro 15

子貢問曰、有一言而可以終身行者乎、

子曰、其恕乎、己所不欲、勿施於人、

(子貢問ひて曰く、一言にして以て終身これを行ふべきものありや。子曰く、それ恕か、己の欲せざる所は人に施すこと勿れ。)

Zu-gung demandis, dirante, "Ĉu estas unu vorto, kiun oni praktiku dum sia tuta vivo?" La Majstro diris, "Ĉu ne, reciprokeco estas tia vorto? Kion vi ne deziras [esti farita al vi], vi ankaŭ ne faru al aliaj."

Komparante la enhavon de la du tekstoj supre-montritaj, ni facile vidas, ke la vortoj de Zu-gung, disĉiplo de Konfucio, en

① Cu estas la unua nomo de Zu-gung.

Kajero 5 estas prezentitaj en Kajero 15 kiel la vortoj de Konfucio.

Pri tiu kontraŭeco mi trovis iom da klarigo en la libro “*Konfucio*” de s-ro Ŝigeki Kaizuka<sup>①</sup>, kiun mi legis lastatempe. Resumante la koncernan parton mi faris liberan tradukon kaj prezentas ĝin ĉi-sube.

La Dudek Kajeroj de “Rongo” estas verkitaj ne mem de Konfucio, sed de liaj disĉiploj — laŭ sia memoro pri la instruoj de la Majstro — en katekisma formo. La kompilo de ĉiuj Dudek Kajeroj bezonis multajn jarojn por fini ampleksante generaciojn de la unuaj disĉiploj ĝis la duaj kaj eĉ triaj pradisĉiploj.

La unuaj Dek Kajeroj formas Parton I kaj la lastaj Dek Kajeroj formas Parton II. Estas rekonite, ke Parto I estis kompilata pli frue, ol Parto II. Laŭ la aserto de d-ro Takeuĉi, kiu elfaris detalan studon per filologia analizo de “Rongo,” ĉiuj Kajeroj de Parto I, escepte la 1-an, 9-an kaj 10-an, apartenas al la plej malnova tempo de ĉi kompilado. El la vidpunkto de tia filologia esploro, oni povas konkludi, ke la katekismo en Kajero 5 estas multe pli fidinda kiel la aŭtentika dokumento, ol tiu en Kajero 15, kaj ke la maksimumo de Zu-gung en Kajero 5, dum ĝi estis buŝe transdonata de generacio al generacio, fariĝis kvazaŭ la vortoj de Konfucio kiel oni legas en Kajero 15.

Kaj ankoraŭ en Kajero 12 la samaj vortoj estas prezentitaj kiel la Konfuciaj, sed la aŭtoro de “*Konfucio*” ne mencias tion.

## 2.

D-ro Albert Schweitzer, la Nobel-premiito en 1953 por Paco, havas sian opinion pri “dulingveco.” S-ro Seaver, la aŭtoro de “*Albert*”<sup>②</sup> *Schweitzer*,” skribas:

Kiel indiĝeno de Alsaco li (d-ro Schweitzer) estis dulingva de siaj fruaj jaroj, sed kvankam en siaj hejmlingvoj li ĉiam uzis la Francan, ĉar tio estis la kutimo de lia familio, kaj la Germanan por siaj libroj kaj lekcioj, li rigardas kiel sian gepatran lingvon la Alsacan dialekton, kiu estas alligita al la Germana, ĉar tiu estas la lingvo, en kiu li pensas, kalkulas, kaj ankaŭ revas. Li asertas, ke kredo en la posedo de du gepatraj lingvoj estas halucino, kvankam oni povus esti egale flua en ambaŭ, kaj ankaŭ, ke adekvata traduko de unu lingvo en alian estas neblaĵo, ĉar ne nur

① 貝塚茂樹著「孔子」(岩波新書)

② “ALBERT SCHWEITZER, The Man And His Mind” de George Seaver

la malsameco de idiotismoj kaŝas en si malsamajn formojn de penso, sed ankaŭ la kadencoj bezonataj de unu lingvo ne povas esti reproduktitaj en la kadencojn proprajn al alia.

Samloke, la vortoj de Schweitzer estas cititaj, ke iam oni petis lin fari mem la francan tradukon de unu el siaj germanaj verkoj, sed provinte li baldaŭ forĵetis la taskon pro neebleco kaj reverkis ĝin en la franca. Mi ankaŭ havis kaj havas la saman opinion kun Schweitzer, eĉ se unu el la du lingvoj estas Esperanto. (Legu mian “Notlibron” en la decembra n-ro de OOMOTO, 1952.)

## 3.

Mi legis “*Konfucio*” kaj “*Albert Schweitzer*” unu post la alia seninterrompe. Min ege interesis, interalie, la fakto, ke ambaŭ estas la grandaj amantoj de la “universala lingvo” — muziko.

Pri Schweitzer la aŭtoro skribas:

Eĉ en lia knabeco estis okazoj, en kiuj la ĉarmo de du-parta harmonio ravis lin kun tia intenso de plezuro, ke li devis sin apogi sur io solida por ke li ne falu.

Aliloke (en la sama libro):

Kiam en la aĝo de dekseks Schweitzer por la unua fojo aŭdis *Tanhäuser* — “tiu ĉi muziko subigis min en tia grado ke mi bezonis tagojn antaŭ ol mi povis doni ĝustan atenton al la lecionoj en lernejo.”

Kredeble, ne malpli sentema estis ankaŭ Konfucio, ĉar

## Kajero 7

子在齊、聞韶三月、不知肉味、曰、不圖為樂之至於斯

(子齊に在りて韶を聞くこと三月、肉の味を知らず、曰く図(豈)ざりき、樂を為すことの斯(き)に至らむとはと。

Kiam la Majstro estis en Ĉi, li aŭdis la Ŝaon por tri monatoj kaj ne konis la guston de viando. “Mi tute ne pensis,” diris la Majstro, “ke [okupiĝo en] muziko povus fari [min] tia!”



## Anoncetoj

LA ESPERANTO GRUPO EN NICE tre bezonas por sia propagando, amason da salutleteroj okaze de la malfermo de ĝia sidejo. Adreso: 25, rue Rossini, NICE (A.M.), Francujo

ĈU VI ESTAS EKS-STUDENTO DE SUPERA KOMERCA LERNEJO?

Se, jes, interesas vin scii, ke la problemo de la Internacia lingvo estos unu el la temoj de la XIV Internacia Kongreso de Eks-studentoj de la Supera Komerca Instruaĉo, kiu okazos en Lyon, Francujo de junio 26 ĝis julio 4, 1954.

Pli ol ducent asocioj el la tuta mondo sendos delegitojn al tiu Kongreso, kiu celas organizi la kunlaboradon de eks-studentoj de la Supera Komerca Instruaĉo sur praktikaj fundamentoj.

Tre dezirinde estas ke multaj Esp-istoj partoprenu kondiĉe ke ili mem estu eks-studentoj de la Supera Komerca Lernejo.

Interesatoj bonvolu tuj skribi al Richard LEVIN, Président de l' Association des Anciens Élèves de l' École Supérieure de Commerce de Lyon, 34, rue de la Charité, Lyon, indikante en kiu Sup. Komerca Lernejo ili lernis, de kiu dato al kiu dato tio okazis, kaj kiun diplomon ili ricevis ĉe la fino de la studado.

## GAZETOJ RICEVITAJ INTERŜANĜE

(La plej laste ricevitaj n-roj indikitaj)

★ Esperanto (UEA), Dec. ★ Heroldo de Esperanto, n-ro 18 ★ La Praktiko, Nov/Dec. ★ The Greater World, No. 1335 ★ Children's Greater World, Dec. ★ Informilo de I.G.E.L., n-ro 6 ★ Sennaciulo, Dec. ★ Argentina Esp-isto, Julio/Aŭg. ★ La Pacdefendanto, Nov. ★ La Ĝusta Vojo, Dec. ★ La Juna Vivo, Nov. ★ Laborista Esp-isto, Dec. ★ Newsletter, No. 20 ★ Boletin, n-ro 12 ★ La Ĉenero, Nov. ★ El Popola Ĉinio, Dec. ★ Dansk Esp-Blad, Jan. ★ La Skolta Mondo, Dec. ★ La Rondo, n-ro 59 ★ Belga Esp-isto, Jan. ★ Universal League, Nov/Dec. ★ La Esp-ista Laboristo, Nov/Dec. ★ American Esp. Magazine, Nov/Dec. ★ The Worker Esp-isto, Oct/Dec. ★ L' Aube Nouvelle, Sept/Dec. ★ Arbetar Esp-isten, n-ro 6/7 ★ Neugeist, Jan. ★ Veko, No. 6 ★ Nia Stelo, Dec. ★ Semu Konstante, Nov/Dec. ★ La Studento, Okt. ★ Aŭstria Esperanto-Revuo, n-ro 11/12 ★ Svenska Esp. Tidningen, Dec. ★ Boletim de Esperanto, Nov/Dec. ★ Stenografio, Nov. ★ La Moderna Voĉo de Indonesia, Nov. ★ L' Esperanto, n-ro 22/23 ★ Land & Liberty, Nov. ★ Esperanto-Post, Dec. ★ Drei Eichen Blatter, Dez. ★ Svisa Esp-isto, Dec. ★ New Zealand Esp-ist, Dec. ★ Bulteno Gepatra, Dec. ★ 人民中國, n-ro 7 ★ Espero Katolika, Jan. ★ Esperanta Revuo, Okt. ★ Paco, Nov/Dec. ★ Bulteno de Esp-ista Klubo en Praha, Dec. ★ Semisto, Nov. ★ Germana Esperanto-Revuo, Jan. ★ Frieden, Jan. ★ La Revuo Orienta, Feb. ★ Samideano, n-ro 30 ★ Liberecana Civitano, 1/Jan.